Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG 5 N° 7 - NOVEMB. 1985

ATENTINDA ...

NIA VENONTA ESTRARKUNSIDO OKAZOS JE SABATO 7-A DE DECEMBRO KIEL KUTIME EN ESPERANTODOMO EN ANTVERPENO.

JE SABATO 23-A DE NOVEMBRO OKAZOS EN BRUSELO LA ĜENERALA JARKUNSIDO DE BEF KAJ DE K L U B O 1 0 0

INFORMILO, KADROGAZETO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
FRANKRIJKLEI 140, 2000 ANTWERPEN
TELEFONO : 03/234 34 00
JARABONO : BF 150,- KONTOJ : 402/5510531-55 KAJ 000-0265338-43

---

## ESTRARO kaj LABORGRUPOJ

1. KUNORDIGADO : Ivo DURWAEL (prezidanto) 03/440 30 92
Paul Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM

Jan BOVENDEERD (sekretario)
Speeltuinlaan 14, 2510 MORTSEL

2. FINANCOJ K. ADMINISTRADO (+ turismo + "taksi stop" + eldonoj)
Erik D'HONDT (estrarano) 053/77 44 97
Wilgstraat 25A, 9440 EREMBODEGEM

Paul PEERAERTS (direktoro) 03/234 34 00
Baron Dhanislaan 13, 2000 ANTWERPEN

Christian DECLERCK (kom. pri literaturo/eldonoj)
Amerikalei 135/2, 2000 ANTWERPEN

3. INFORMADO GAZETARA SERVO Edward SYMOENS (estrarano) 03/666 62 66
Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT

Herman DECEUNINCK (kom. gazetara servo) 02/360 17 22
Villalaan 1 b.4, 1500 HALLE

Wim DE SMET (kom. sciencoj) 03/666 99 49
Hertendreef 12, 2180 KALMTHOUT

4. INSTRUADO - PROPAGANDO - EKSPOZICIOJ - KONGRESOJ

Petro DE SMEDT (gvida komisionano) 052/21 26 77
Hemelstraat 44, 0330 DENDERMONDE

Marc VAN DEN BEMPT (komisionano) 016/20 14 53
Duisburgsestraat 12, 3030 LEUVEN-HEVERLEE

Albert CLAESEN (komisionano) 011/33 66 03
Zonnebloemstraat 7, 3610 DIEPENBEEK

Ray GERARD (komisionano)
Antwerpsesteenweg 24, 2250 BROECHEM

5. GRUPA AGADO Hilde VANINGELGEM-VANDRIESSCHE (estrarano) 053/70 50 11
Arbeidstraat 21, 9300 AALST

Trees DOOMS (prelegvojaĝoj) vidu P. Peeraerts

Jules VERSTRAETEN ( OMBUDSMAN) 03/827 66 43
St. Bernardsesteenweg 1078, 2710 HOBOKEN

Rilatoj kun FLEJA : Hilde VANINGELGEM



## PROTOKOLO

pri la estrarkunsido de sabato 9-a de novembro 1985 en Antwerpen

---

Ĉeestis : Erik D'Hondt (ED), Ivo Durwael (ID), Paul Peeraerts (PP), Edward Symoens (ES) kaj Jan Bovendeerd (JB)
Senkulpigon petis : Hilde Vaningelgem-Vandriessche.
Prezidis : ID
Protokolis : JB
Komenca horo : 10.00 h.

## TAGORDO

1.1. La protokolo pri la antaŭaj estrar- kaj ĝenerala kunsidoj (85 09 14 kaj 85 10 05) estas aprobitaj.

1.2. Tamen, rilate al la 2-a paĝo de INFORMILO, estu ŝanĝota la titolo en " ESTRARO KAJ LABORGRUPOJ".

2.1. BEF-jarkunsido.
La teksto de la de JB preparita aktivec-raporto estas aprobita, krom kelkaj detaloj, kiujn JB ŝanĝos.

2.2. Klubo 100.
Ankaŭ la tiurilata raporto estas aprobita.

3. KONGRESO 1986 en Blankenberge.

3.1. La kongreso tamen okazos je 29, 30 kaj 31-aj de aŭgusto 1986 kaj ne kiel indikite en la protokolo pri la 85 10 05-kunsidoj (vd P. 1.2.1.)

3.2. La organizantoj proponis okazigi, krom ĝeneralan kunsidon de FEL, akademian kunsidon kun 3-o da prelegontoj kaj publika debat-ebleco. ID proponas tamen anstataŭi tion per studotago, samtempe kun turisma programo por personoj, kiuj ne ŝatas partopreni la studotagon.

3.3. Kiel temon, ni proponu "ESPERANTO EN LA AKTUALECO".
ES akceptas ĝian preparon kaj eventualan gvidadon.

4. Letero de ES por studentoj. (vidu ankaŭ punkton 13 de la protokolo pri la estrarkunsido de 95 19 14, INFORMILO aug. sept. 1985 p. 6 )

4.1. ES akceptis prepari leteron por dis-sendo al studentoj kaj universitatoj sed al kiu(j) kaj kiel ? Ĉu ni povas helpi ?

4.2. JB proponas klopodi publikigi la aferon en universitataj (student-) revuoj.

4.3. Aliaj pensas pri peto al A. Staes serĉi la taŭgan vojon al diskonigo.

4.4. ES proponas aldoni al la letero aŭ almenaŭ mencii la ekziston de bibliografio ĉe UEA.

5. INFORMADO - PROPAGANDO (ES)

5.1. AIMAV (RUG) organizos kolokvon en 1987. ES proponis "ESPERANTO EN LA LERNEJO. BILANCO KAJ PERSPEKTIVOJ".
AIMAV volus plilarĝigi ĝin al " LA INTERESO DE 'lingua franca' (pro. lingŭa franka) UNUVERSALA, NATURA KAJ ARTIFIKA "
La laborlingvoj estos la franca, angla, nederlanda kaj Esperanto.

5.2. La ĉefredaktoro de la lernejaj revuoj "Blikopener" por 15-16 jaruloj kaj "Reflector" por 17-18 jaruloj, pozitive reagis al propono de ES pri publikigo de introduka artikolo pri Esperanto.

5.3. Same faris "DE VLAAMSE GIDS" (Willemsfonds) rilate al 6-paĝa arti[kolo] pri "MULTLINGVECO : 2-a SOLVO; 3-a SOLVO : ESPERANTO."

5.4. UEA - S-ro Rousset
S-ro Rousset, juna franco, studinta de la Pariza universitato, faras staĝon en la Centra Oficejo de UEA, subvenciatan de la franca ŝtato.

5.5. Claude Piron akceptis verki "MANLIBRON PRI PSIKOLOGIO"

5.6. Lingva borso okazos je la 14-a kaj 15-a de marto 1986. Ĉu FEL ion entreprenu tie ?
Normale tion prizorgas la Brusela grupo, kvankam FEL povas disponigi sian ekspozician materialon.
FEL jes havos standon en la Naturborso en Antverpeno en aprilo 1986.

6. KURSOJ

6.1. Ekzamen(et)oj

6.1.1. Ĉu ni postulu de la kursgvidantoj ke ili faru ekzamen(et)on por taksi ilian kapablon, eventuale kadre de la kadrokursoj ?
Malfacila demando, ĉar ĉu ni povos malhelpi al iu, kiu volas organizi kurson, tion fari ? .. eĉ se temas pri 'fuŝulo' ? Verŝajne, ĝus[te] la fuŝuloj ne akceptos, ĉar ili ja estas ĝenerale konvinkitaj de siaj bonaj kvalitoj..
ID timas ke la establita movado estas netuŝebla, sed ke jes ni povos havi influon sur la novuloj.
Se ni jes organizu tiajn ekzamenojn, ĉu tiam por ĉiuj instruantoj aŭ ĉu nur por novuloj ?

6.1.2. Ĉiu opinias, ke ni jes organizu ekzamenon por ĉiuj instruantoj kaj ke ankaŭ tiam ni atentu aŭ reklamu nur pri tiuj, kiuj sukcesis en nia ekzameno. Alivorte, se iu volas publiki sciigon pri kurso, ni rifuzu tion se li/ŝi ne disponas pri atestilo nia.

6.2. Proponiĝas petide la Komisiono pri Instruado ellabori kadrokurson kaj ekzamenon por insruistoj/-antoj alireblaj por jamaj insturantoj, sed devigaj por novuloj.

6.3. Ankaŭ proponiĝas konferenco pri la temo.

Paŭzo de 12.40 ĝis 14.00 h.



7. FINANCOJ
Post detala ekzameno kaj pridiskutado de la finanica situacio, konkludiĝas ke la respondeculoj pri la financoj tre bone faris sian laboron kaj ke la situacio estas kontentiga.

8. Plano van Duijne (Kampado)

8.1. Jam alvenis unu reago al nia artikolo en ESPERANTO PANORAMA. Ĝin plusendos al S-ro van Duijne PP

8.2. ID tradukis la artikolon kiu aperis en ESPERANTO PANORAMA, post ioma resumado, Esperanten kaj komisias JB sendi ĝin kun peto pri publikigado al UEA, Heroldo de Esperanto, Franca Esperantisto, Budapeŝta Informilo k.s.

9. Centra Katalogo pri Esperantoverkoj en Flandraj Bibliotekoj

9.1. ID informiĝis ĉe la ministerio rilate al la eblecoj pri aĉeto de kvanto da ekzempleroj por distribuado en la diversaj publikaj bibliotekoj. La respondo estis, ke la subvencimanieroj ŝanĝiĝis. La ministerio ne plu subvencias per aĉetoj, sed per salajroj. El tio sekvas, ke ni mem alpaŝu la bibliotekojn por eventuala vendado de la katalogo.

9.2.1. Tamen la katalogo ankoraŭ ne estas difinitive preta. Ĝi bezonas ankoraŭ kompletigon.

9.2.2. Decidiĝas peti la kunlaboron de la grupoj, kiel cetere jam okazis por la kunmeto de la unuaj donitaĵoj.

9.2.3. ID kaj JB preparos formularon tiu-celan por dissendi al la grupoj kun la peto ke ili kiel eble plej bone kompletigu la projekton de kiu ili intertempe estos ricevintaj ekzempleron.

10. Manlibro por aktivuloj

10.1. PP sin demandas ĉu indas ankoraŭ daŭrigi la laboron, ĉar por la dua serio da kompletigaj paĝoj eĉ ne 1/5 de la unuaj abonantoj renovigis sian abonon.

10.2. Ĉiu opinias ke ni nepre daŭrigu sed ke pri ĝia ekzisto kaj valoro ni regule reklamu en ESPERANTO PANORAMA kaj LIBROVERMETO.

11. IVIO
Responde al nia mendo de la kajero "AO.2081 - ESPERANTO" de la

"Stichting IVIO" en Lelystad, Nederlando, la eldonisto sciigis al ni ke ĝi komplete elĉerpiĝis. Represo estus ebla nur per 1000 ekzempleroj je po 2,60 gld (= ± 50 BF)
Tian kvanton ni ne povos garantii.
Tial JB sendos la respondon al Nederlandaj Esperanto-instancoj.

Fino de la kunsido : 16.00 h.

JB.

-----------------



## LA INTERHOMAJ RILATOJ EN FEL - II

### PLIA ANALIZO (Ivo Durwael)

Mi ripetas mian anataŭn artikolon en kelkaj frazoj :
La menso de ĉiu homo konsistas el tiuj eroj, facile rekoneblaj post iom da provado :
- Gepatro (= kutimoj, tradicioj, aŭtomatismoj)
- Plenkreskulo (= analizo de informoj, prijuĝo)
- Infano (= emocioj, intuicio, sentoj ...)

Se vi atentas la konduton de gepatroj, vi facile malkovros du speciojn de reagoj, nome :

a) la Kritikeman Gepatron, ekz. "Ne malpurigu vin. Rapidu ! Vi mensogas. Vi ne prizorgas viajn vestaĵojn ", sed ankaŭ : "Mi estas la estro ĉi tie La tuta mondo malestimas lin. Li ĉion fuŝas ! ..."
Tiaj reagoj ofte estas akompanataj de la ĝeneraligaj vortoj "ĉiam, neniam, neniu, ĉiuj ... " Ekz. "Ĉiuj ŝatas lin. Mi neniam plu volas revidi lin. Neniu pretas kunlabori. Ĉiuj esperantistoj estas stranguloj. Ĉiuj junuloj dezirus tion, sed neniu LKK-ano volis akcepti la proponon."
b) la Zorgeman Gepatron. Ekz. "Ĉu vi ne malvarmas? Ĉu vi sidas komforte ? Vi estas sola, venu morgaŭ ĉe ni. Vi aspektas malfeliĉa, ĉu vi havas zorgojn ?"

En la Infano ni malkovras tri subdividojn, nome :

a) la Naturan Infanon, el kiu fontas nia emo por tuj efektivigi tion, kio plaĉas al ni, por kontentigi niajn sentojn, nian kreivecon, nian scivolemon ktp.
Pro nia Natura Infano ni povas ĝui malkovrojn. Rimarku kiom intense infano ridas, kiam ĝi unuan fojon sukcesas konstrui turon, funkciigi trajnon, kapti pilkon, fari puzlon, resume dirite, manipuli objektojn laŭ sia deziro.
b) la gepatroj kompreneble metas multajn bremsojn por la Natura Infano per sia fizika supereco. Tiel estiĝas la Adaptita Infano : frustacio, rezignacio aŭ reĵeto. Infano povas koleri, kriegi, bati per la piedoj, sed ankaŭ kun malfeliĉa mieno obei aŭ sidi pasive en anguleto.
c) Iom post iom disvolviĝas la Malgranda Profesoro. La infano malkovras nerektan vojon por plenumi siajn dezirojn : "Avinjo donas pli da bonbonoj ol panjo, do, mi ŝatas viziti ŝin." - "Panjo koleras kiam mi prenas kukon, sed ne rimarkis, ke mi forprenis unu en ŝia foresto" ktp.

Ankaŭ plenkreskuloj havas tiujn ĉi tri subdividojn en sia menso.

La Natura Infano kondukas nin al senzorgeco. Precipe en feria etoso, nia Natura Infano denove ekaktivas : plenkreskuloj kiuj ludas en la sablo aŭ en la maro.

La moderna reklamo apelacias precipe la Naturan Infanon.

La Adaptita Infano vidiĝas ĉiutage en la rilato estro/gvidato ; direktoro/subulo, dungito ; prezidanto/membro ...

Se iu proponas planon, kiu plaĉas al li mem, sed kiu ne trovas aprobon aŭ apogon ĉe la aliaj, li emas paŭti aŭ faras kelkajn acidajn rimarkojn, fariĝas kverelema, primokas ŝiajn kolegojn aŭ minacas ilin per : " Vi respondecos pri la konsekvencoj !" ...

La Malgranda Profesoro sendube plej bone vidiĝas ĉe la amindumaj ritoj. Sed ekzistas tuta skalo da sociaj senkulpigoj por eskapi al aferoj, kiuj malplaĉas al ni : "Mi bedaŭras, sed mi ne povis ĉeesti la kunsidon, ĉar mia patrino vizitis min. ... mi devis butikumi. ... mia najbaro tro longe retenis min. ... mia edzino bezonis la aŭton. ...

Mi ripetas, ke la Transankcia Analizo tute ne kondamnas aŭ malaprezas iun el tiuj eroj. Kontraŭe, la homoj, kiuj ekstermis unu el tiuj priskribitaĵoj estas tiuj, kiuj bezonas psikiatron.

La ĉaptiro nomiĝas M e m a n a l i z o .

La unua paŝo estas konsciiĝo. Poste kaj iom post iom, vi povos ŝanĝi tion, kio eventuale malfeliĉigas vin.

daŭrigota.

ID.

---